


# PONTO☆

*Jaro 4 N-ro 5 (25) Organo de Sunda Esperanto Agado dec. 2005*

## BONVENON AL 100-JARA JUBILEA KONGRESO EN MALMÖ 25-28/5 2006!

**KOMUNA KONGRESO DE SVEDAJ KAJ DANAJ ESPERANTISTOJ**

**En 2006** Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö (KEM) 100-jariĝos! Por festi tion ni invitas la svedajn esperantistojn kongresi en Malmö.
Ni ĝojas ke ankaŭ Dana Esperanto Asocio akceptis okazigi sian jarkongreson kune kun ni. Espereble estos multe da fruktodonaj kontaktoj inter svedoj kaj danoj!

### Kongreso dum 4 tagoj

La kongreso komenciĝos ĵaŭde 25/5 posttagmeze per vizito en la ejo de KEM kaj interkona vespero en la kongresejo, Popolaltlernejo Kvarnby. Dimanĉe la 28/5 la kongreso tradicie finiĝos post la ĝisrevida lunco, sed estos ebleco fari postkongresan viziton en Kopenhago samtage

### Kongresaj ejoj

La kongreso okazos en Popolaltlernejo Kvarnby, sufiĉe proksime al la centro de la urbo. Je kelkminuta promena distanco vi trovos *Jörgen Kocksgymnasiet* kaj la preĝejo Sankt Pauli, lokoj por la inaŭguro kaj diservo.

### Kongresa temo

La temon "Lingvaj problemoj en EU" pritraktos kompetentaj esperantistoj: Seán Ó Riain, Irlando, Povilas Jegorovas, Litovio kaj Georgo Handzlik, Pollando kiu krome distros per muziko.

### Distraĵo

Koncertoj okazos kun *La perdita generacio*, oficiale malfermita ankaŭ por la Malmöanoj. Muzikos ankaŭ Georgo Handzlik. Kim Henriksen dancigos nin post la festmanĝoj

### Pliaj informoj

En la retpaĝo de Sunda Esperanto Agado (SEA) ni planas daŭre aktualigi novaĵon pri la kongreso kaj estos ebleco aliĝi per ĝi.

Informojn vi ankaŭ povas ricevi de la kongresa sekretario Karin Lindquist, tel 040-980120 aŭ karin-lindquist@telia.com.

**www.agado.net**

La klubo kaj ĝia diligenta kongresa komitato atendas vian partoprenon!

Koran bonvenon al Malmö!
Sten Svenonius
Prezidanto de KEM kaj la kongresa komitato

Daŭrigo sur paĝo 5!

### Kurso por komencantoj/daŭrigantoj

**De la 30-a de januaro ĝis la 3-a de februaro** okazos vespera kurso por komencantoj kaj posttagmeza kurso por daŭrigantoj en Kopenhago.

**Kursgvidanto estos la prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), Radojica Petrovic.**

Interesatoj bonvolu kontakti la prezidantinon de DEA Ileana Schrøder,Tel. + 45 32 51 31 16, retadreso: dea@get2net.dk

**Bonan Kristnaskon kaj Bonan Finon de la nuna jaro!**

**Dum 2006 ni kune agadu por sukceso en nia esperantolaboro /La redakcio**

Nästa **Ponto**, nr 1 utkommer ca 11.2.
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
**senast den 28.1**

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado)



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 76 N-ro 5 (694)* **>>ĉiam antaŭen<<**

Fondita en 1906


**Pro informo pri la Jubilea Kongreso la protokolo pri SEA-kunsido kaj pri la agabla 75-a jubileo de LEK en Lund publikiĝos nur en Ponto nr 1:06**

## Ordinara kunsido la 9-an de novembro

La prezidanto Sten Svenonius bonvensalutis la partoprenantojn.
Asta Schaedel elektiĝis kiel protokolkontrolanto.
Kursplanoj por printempo 2006:
Konversacia kurso okazos lunde je la 14-a h sub gvido de Kjell Persson kaj ĝi komenciĝos lunde 16-an de januaro.

Gertrud Lund informis pri la printempaj programeroj:
18.01 Vojaĝo al Kirgizio. Daniel Granello rakontos kaj montros bildojn
01.02 Viva Gazeto
15.02 Libroaŭkcio
01.03 Agneta Lund rakontos pri vizito en Maroko
15.03 Jarkunsido
29.03 Kunveno
12.04 Kunveno
26.04 Ordinara kunsido

Estis decidite aboni Monaton kaj La Ondon dum 2006

Sten raportis pri ankoraŭ kelkaj pretaj punktoj dum la jubilea kongreso - Peter Bankholm aranĝos la manĝaĵon, La muzikgrupo "La perdita generacio" distros nin kaj Kim lernos nin danci!
Ambasadoro el Irlando Seán Ó Riain venos vendrede por fari la festparoladon. Aliaj parolantoj estos Pavilas Jegorovas, Litovio, kaj Georgo Handzlik, Pollando

### 5.10 Filmmontrado

Alf Mobark pretigis videofilme malnovajn filmojn faritajn de klubmembroj. Ekz. la filmo pri la UEA-kongreso en Malmö en 1948 estas valora memoraĵo. Ni spektis ĝin kaj kelkajn aliajn por prijuĝo kiujn de ili ni montru dum nia jubileo venontjare.

### 15.10 Aŭtuna festo

La ĉi-jara aŭtuna festo estis multnombre vizitita. Gastoj venis de Kopenhago, Lund, Helsingborg. Kompreneble nia "ĉefgasto", la novelektita prezidanto de SEF Bengt-Olof Åradsson estis la kialo. Li rakontis pri siaj okupoj en la esperanto-mondo kaj ankaŭ pri sia tempo en Skanio.
La festkomitato tre bele ornamis la ejon kaj ni bone manĝis, trinkis kaj kafumis
La atmosfero vere estis sur la pinto la tutan vesperon!

### 26.10 Someraj travivaĵoj

Per-Olov komencis parolante pri muzikaĵoj dum la Malmöa festivalo. Karin memoris vizitojn en Arboga kaj Smögen kaj Asta plukis berojn en Hälsingland. Gerd faris 20 ekskursojn per trajno en Skanio. Poste Gulli rakontis pri ekskurso kun dimanĉa lernejo al Toppeladugård dum siaj infanjaroj. Fine Gertrud parolis pri vojaĝo ĉirkaŭ la lago Vättern.

### 12.11
### Paroliga kurso – SEA- aranĝo



Gaja atmosfero kaj diligenta laboro karakterizis nian studtagon gvidita de Ann-Louise Åkerlund. Ni multe lernis sed ankaŭ konstatis ke ni bezonas plurfoje ripeti tiajn paroligajn okazojn.

**Du gajaj partoprenantoj Betty kaj Åke**

### 20.11 Aŭkcio

Tute tradicie ni okazigis nian antaŭkristnaskan aŭkcion, kiu estis la 66-a laŭvice. Alf kaj Sten, la aŭkciantoj, same kiel la ceteraj komitatanoj kaj kompreneble ĉiuj ĉeestantoj kunhelpis al la gaja atmosfero kaj al la bona mona rezulto.

### Danko

Al ĉiuj donacintoj kaj ĉeestintoj dum la aŭkcio same kiel al mondonacintoj ni eldiras nian plej koran dankon.

La estraro de KEM


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☎ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☎ 040-19 14 77


## Konversacia kurso


**Ĉiuj, kiuj volas plibonigi sian Esperantan paroladon (speciale nun antaŭ la jubilea kongreso) estas bonvenaj al nia konversacia kurso.**
**Ĝi komenciĝas la 16.an de januaro 2006. La tempo estas inter la 14-a kaj 15.30-a h. (obs. la horon). La kurso estas senkosta.**
**Venu ĉiufoje aŭ kelkfoje!**



**Kjell Persson**

# Kontaktilo

***Membrogazeto de K.E.K***
***Konversacia Esperantista Klubo***
***Kopenhago***
**N-ro 5 (664) 2005 69a-jaro**





Bodil Kuhlmann

**Honora membro de KEK**

La 10an de oktobro membroj de KEK honorigis Bodil Kühlmann per eta ujutna ceremonio en ŝia hejmo en Brønshøj. Ni dankas pro la grandega laboro vi faris por KEK kaj esperanto.

**La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas 18.30 - kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79.**

**Kutimaj horoj:**

Kursoj 18.45 -19.30 + 20.00 -20.45 Legogrupo 19.00 -19.30 kaj 20.00 -20.45 Kafo/teo-trinkado 19.30 – 20.00 Programo aŭ studgrupo 20.00 - 20.45 + 21.00 – 21.45

**Ĝeneralkunveno de KEK la 20-an de februaro 2006 je horo 20.00.**

**TAGORDO**

a. Elekto de direktanto.
b. Elekto de protokolanto.
c. Raporto de la prezidanto pri la agado dum 2005
ĉ La kasisto prezentas la kalkulaĵon por 2005 kaj la budĝeton por 2006.
d. STATUTO de KØBENHAVNS ESPERANTO KLUB, K.E.K. ekzistas nur en Esperanto kun la lasta ŝanĝo la 31-an de januaro 1962. Ni tradukos en la danan kaj prezentos la ŝanĝojn celante aprobon.
e. Proponoj (ili estu ĉe la prezidanto 10 tagojn antaŭe). Elekto de 2 estraranoj por 2 jaroj (funkcias nun Bent Jensenius kaj Egon Starup-Jensen).
f Elekto de 2 estraraj anstataŭantoj por 1 jaro (funkcias nun Ana Røssum kaj Zita Garbaraviciené).
ĝ. Elekto de 1 revizoro por 2 jaroj (funkcias nun Aleksander Kogan). Elekto de 2 revizoraj anstataŭantoj por 1 jaro (funkcias nun Jens S. Larsen).
ĥ. Eventualaĵoj.



**Jytte en la budo**

Pri la internacia tago de Kopenhago

La komunumo 3-an fojon okazigis tian aranĝon helpe de la integriĝ-konsultaro. Ĝi okazis sabate 27/8-05 je horo 12-18. Ĉirkaŭ 30 invititaj grupoj povis prezenti siajn aktivecojn, kulturon kaj muzikon (ekz. *Københavns Esperantoklub, Dansk-Sydslavisk Forening* kaj *Den Irakiske Kvindeforening).* Ĉe la aliaj budoj eblis ĝui kulinarajn specialaĵojn el la tuta mondo. Multaj homoj preterpasis. Al ili ni disdonis flugfoliojn, celante ke homoj almenaŭ konu pri esperanto – kun informo pri kursebleco. Kelkaj vizitis nian ekspozicion. ”Esperanto-Nyt” ni havis por ili. – . Inter fremdaj budoj kun bela vetero ĉe la lago ni kvazaŭ estis eksterlande. *Raportas Jytte Sunekær.*

**Pri la Paroliga Kurso en Malmö 12/11**

Ann-Louise tre sperte aktivigis la grupon. Ni danoj, Sooki, Betty kaj mi ekkonis aliajn svedojn. Ni aktoris, ŝerce trompiĝis kaj multe amuziĝis – *raportas Jytte.*

**Ekzamenoj**


KEK planas aranĝi esperanto-ekzamenojn en la printempo kun la dana ekzamena komisiono. Ni ekzamenos en la kaj 2a grado. Bonvolu kontakti Kim J. Henriksen por informoj kaj aliĝo:
telefone: 32 54 93 54, rete: kek@esperanto.dk

**Novaĵletero**

KEK restarigis la danlingvan novaĵleteron pri esperanto. Ĉefe estas informoj pri esperanto en Kopenhago, sed ni bone povas imagi ke ĝi estu ĝenerala informletero pri gravaj esperantaj okazaĵoj en Danio/mondo. Ĉirkaŭ unu fojon monate ni ĉirkaŭsendas la informojn. Vi povas aliĝi ĉe kek@esperanto.dk kaj kompreneble vi ĉiam povas malmendi ĝin denove.
*informas*
*Kim J: henriksen*

**Radikal Ungdom** (politika asocio)

KEK estis kontaktita de junuloj de *Radikal Ungdom,* kiu interesiĝas pri tio ke ilia partio proponu esperanton kiel la dua lingvo por ĉiuj en Eŭropo. Kim J. Henriksen kaj Ileana Schrøeder havis kunvenon komence de oktobro kun kvar el ili, kie ni rakontis pri avantaĝoj de esperanto kaj donis bonajn argumentojn. Dum la lasta semajnfino de oktobro okazis la jarkunveno de Radikal Ungdom, sed bedaŭrinde granda multnombro malapogis la proponon. Sed pluraj, interalie la landa gvidestro, montris intereson, kaj la grupeto deziras inviti nin denove por paroli al pli granda grupo iam dum la printempo.
*informas*
*Kim J: henriksen*



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Karaj klubanoj kaj samideanoj.**

Kiam mi lastfoje skribis en Ponto estis aŭtuno. Nun jam estas advento kaj baldaŭ nova jaro. Okazis nia lasta studkunveno ĉe Barbro kaj nia lasta klubkunveno en Faktorsgatan.

Koncerne Faktorsgatan vere estis la lasta kunveno, ĉar ni decidis ĉesi la ludkontrakton ĉe PRO. Dum la jaro 2005 ni preskaŭ neniam uzis la ejon. Anstataŭ tio ni kunvenos ĉirkaŭ tablo en Café Birger en la urba biblioteko (Stadsbiblioteket). Ni starigos nian surtablan flageton, mendos kafon aŭ teon, kaj babilos. Eble homoj scivolemos kaj volos partopreni. Ni kunvenos la trian sabaton de la monatoj januaro (21/1), februaro (18/2), marto (18/3), aprilo (22/4, fakte la kvara sabato de tiu monato) kaj majo (20/5). Ankaŭ vi estos bonvena.

**Dum la venonta semestro ni aranĝos prelegojn en la aŭditorio de la urba biblioteko, en la sveda, por la ĝenerala publiko. La 11-an de februaro Lars Forsman rakontos pri Esperanto – la lingvo kaj la movado. La ekzaktan titolon de lia prelego mi ankoraŭ ne havas. Por profiti de lia vizito ĉi-tie ni provos aranĝi ankaŭ ion alian, ekzemple informado en lernejo(j). Ĉu alia klubo volas kapti la okazon inviti lin?**

**Sabate la 13-an de majo 2006 je 13.30 en la aŭditorio de la urba biblioteko Bertil Nilsson prelegos pri la ide-historio de esperanto sub la titolo:**

**Esperanto; vilken var tanken – och vad blev det?**

**Estos tre interesa prelego, notu en via kalendaroj kaj venu amase!**

Restas de la jaro 2005 la kristnaska periodo kun multaj festoj: Zamenhof-festo, Luĉia-festo, julemiko en Danio, kristnaskaj festoj kaj novjara festo. Eble kelkaj el vi partoprenos novjarajn renkontiĝojn en Lesjöfors aŭ en Germanio (Internacia Festivalo IF aŭ Novjara Renkontiĝo NR). Antaŭ kelkaj jaroj mi ĝuis la etoson de IF kaj varme rekomendas tiun aranĝon. Mi kredas ke NR estas same bona.

Mi deziras al vi ĉiuj
**ĜOJAN KRISTNASKON kaj FELIĈAN NOVAN JARON.**
Ann-Louise



Bildo de Ann-Louise gvidante la Paroligan Kurson en Malmö la 12 nov.

---

## La Esperanto klubo de Lund

Karaj LEK-anoj!

Unue el nia taglibro: la 13an de oktobro Asta Schaedel kaj Ursula Kwasniewska prezentis impresojn pri la UK 2005 en Vilno. Agrabla surprizo estis bonvensaluti sinjorinon Akiko Snarberg el Jönköping. Ankaŭ de ŝi ni aŭdis pri travivaĵoj dum tiu UK.
Nekutime multaj venis kiam Daniel Granello la 10an de novembro rakontis pri fora, al la plej multaj el ni ne konata, nome Kirgizio. Ni povis sekvi la vojaĝantojn pere de diapozitivoj: belegaj montaraj kaj lagaj regionoj. Daniel rakontis pri historiaj eventoj, la geografia, politika kaj lingva situacioj kaj popolaj moroj. Espereble sekvos nova ĉapitro, ĉar Daniel revas pri reveno kiam printempas en tiu nature tiel bela lando.

Rakontindas pri tre sukcesa publika programo en Ekska Huset la 1-an de okt. Dum 30 minutoj LEK havis la okazon prezenti la kluban historion dum 75 jaroj (Ulla Saether), kiel sonas la lingvo (dialogeto inter Ragnhild Berntsson Laskowski kaj AML) kaj fine ”Olle Olsson, vera famulo en Lund” – precipe konata pro esperanto (AML).

Ĉeestis proks. 20 personoj. Ni ricevis buterpanon kaj kafon – kaj ni ne forgesu: la aranĝinto presis afiŝon kaj anoncis en SDS (2 foje) kaj Skånska Dagbladet.

Ĉeestis Karl-Erik Birkesand, kiu nun kun sia filino Cecilia komencis studi la lingvon. Ni volonte revenos al tiu interesa ejo. Broŝuro pri Eka Domo estas tradukita.
La 24an de okt. la UN-Asocio de Lund havis vere festan programon en Kulturen. LEK ofertis informmaterialon kaj montris gazetojn. Ĉeestis entute 11 esperantistoj kaj studento el Brazilo, kiu studis esperanton en Karlskoga.
En venonta PONTO ni raportos pri nia jubilea festeto.
Al vi ĉiuj ĝojplenan julon kaj pacan 2006!
*Kun koraj salutoj*
*La Estraro de LEK*



## Programo de la kongreso 25-28/5

**Jaŭde 25/5**

**Horo**

15.00 Dokumentoj haveblas en kongresejo

15.30-17.00 Malfermita domo de KEM

18.00- Interkona vespero – i a filmo pri la UK 1948, muzika distraj'o

**Vendrede 26/5**

09.00 Estraroj SEF, DEA (nepublika)

10.00 Jarkunsido ILEI

11.00 Junularo SEJO kaj DEJO

12.00-13.30 Lunĉo

14.00-17.00 Inaŭguro – Salutparoladoj, muziko festprelego Seán Ó Rian

Komuna supeo

20.00 Eta danckurso, aŭkcio

21.00 Koncerto, publika por la urbanoj La perdita generacio/Handzlik

**Sabate 27/5**

09.00-12.00 Jarkunveno SEF, DEA

12.00-13.30 Lunĉo

13.30-15.00 Prelego – kongresa temo

15.30-17.30 Ekskurso per pramo Rundan sur la kanalo de Malmö

19.00 Komuna supeo

20.30 Muziko, eta danckurso

21.00 Koncerto, publika por la urbanoj La perdita generacio/Handzlik

**Dimanĉe 28/5**

08.30 Jarkunsido Eldona Societo

08.30-09.30 KELI, Diservo en Pauli preĝejo

09.30-12.30 Prelegoj – kongresa temo

12.30 Ĝisrevida lunĉo

13.30 Postkongreso en Kopenhago

La programo estas provizora kaj ŝanĝoj povas okazi. Alternativaj programoj estos promenoj en Malmö kaj ludo de petanko.

## Manĝoj

Ĉiuj manĝoj okazos en la kongresejo kaj nia kuiristo, Peter Bankhom, estas konata pro siaj bongustaj mangaĵoj.

## Tranoktado

La partoprenantoj mem mendas sian hotelon. Ni rekomendas Quality Hotel, kiu situas apud la koncerta domo je 15-minuta promeno de la kongresejo, telefono 040-6646000. Indikante "Esperanto-kongress" vi ricevos rabaton.

Rigardu www.agado.net por aliaj pli malmultekostaj alternativoj, precipe por la unua nokto!

Alian hotelon vi povos mendi telefone 040-341200 aŭ rete www.malmo.se/hotell aŭ www.metrotravel.se.

**Gejunuloj povos senkoste tranokti en la kongresejo kun propra dormosako!**

## Aliĝo

Vi aliĝas al la kongreso plenigante la aliĝilon. Se vi tion faros plej malfrue la 31/3 la kotizo estos malpli alta.

Danoj aliĝas al DEA.




## SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera

på esperantotidningar för 2006. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på pg 14 74 29-5, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, Tel. 0415-50152

| **Tidning** | nr/år | pris kr |
|---|---|---|
| Brazila Esperantisto | 4 | 120* |
| Esperanta Finnlando | 6 | 170 |
| Esperanto | 11 | 330 |
| Esperanto Dokumentoj | 10 | 260 |
| Esperanto en Danio | 5-6 | 125* |
| Femina | 4 | 190 |
| Fonto | 12 | 285* |
| Heroldo | 17 | 305 |
| ICEM | 4 | 170* |
| Juna Amiko (rabatt från 3 ex) | 3 | 130 |
| (Rabatt från 3 ex.) | | 105 |
| Komencanto | 6 | 140* |
| Kontakto | 6 | 190 |
| La Hirundo | 8-10 | 150* |
| La Jaro | 1 | 49 |
| La Kancerkliniko | 5 | 200 |
| La Ondo | 11 | 250 |
| Literatura Foiro | 6 | 260 |
| Litova Stelo | 6 | 130 |
| Oomoto | 2 | 100 |
| | | |
| Ret-Info | | 175* |
| Rok´Gazet | 1 | 155* tre nr. |
| Scienca Revuo | 4 | 185 |
| TEJO-tutmonde | 4 | 100 |

Tidningar markerade med * har inte lämnat prisuppgift för 2005

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan
jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h.
en la ejo de nia studorganizo SENSUS,
Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en
Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe
Barbro Haraldsson tel. 042-121471

*Retpaĝo de SEA www.agado.net*

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn
tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32
54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset,
Danasvej 30 B, atingebla per
buslinio 29 el stacio
Vesterport,salono n-ro 1,
dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ . 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas
demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al
Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en
Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk

## Bliv medlem i UEA 2006

UEA behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- sprida esperanto
- verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt och därmed öka förståelsen mellan folk och länder

Du betalar till postgiro **14 74 29-5, SEF specialkonto**. Ange på talongen vad pengarna avser.
Lisbet Andreasson, Södra Rörum,Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, tel. 0415-50152

**Avgifterna år 2006**:

| | | |
|---|---|---|
| MA | Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto. | 520 kr |
| MJ | Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan! | 210 kr |
| MG | Direktmedlem med ”Gvidlibro”. Ger inte nersatt kongressavgift | 80 kr |
| SZ | Avgift för ”Societo Zamenhof”, särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA. | 1 040 kr |
| PT | ”Patrono de TEJO”, får tidningen Kontakto | 630 kr |
| DM | ”Dumviva membro” betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto | 3 000 kr |
| DMJ | ”Dumviva membro kun jarlibro” betalar för hela livet. Får årsboken | 5 250 kr |
| Dpat | ”Dumviva Patrono” betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i ”Societo Zamenhof”. | 130 000 kr |
| DPT | ”Dumviva Patrono de TEJO” betalar för hela livet och får tidningen Kontakto. | 15 750 kr |